# Brokanta servo de CDELI

**Centre de Documentation et d'Étude sur la Langue Internationale**
Bibliothèque de la Ville, rue du Progrès 33, Case postale 3034
**Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia**
Biblioteko de la Urbo, strato Progrès 33, Poŝtfako 3034
**CH-2303 La Chaux-de-Fonds**

Archiviste/arĥivisto: Claude Gacond.

Telefono:
el Svislando : 032 967 68 55
el eksterlando : prefikso por Svislando + 32 967 68 55

# Ĝeneralaj informoj

## Celo de la servo:

La brokanta servo de CDELI helpas al kolektantoj de esperanta kaj interlingvistika materialo (individuoj aŭ institucioj). Malnovaj libroj, broŝuroj kaj periodaĵ-numeroj, aperintaj en esperanto kaj en aliaj planlingvoj, estas proponataj sen profitcelo. Claude Gacond, la arĥivisto de CDELI, plenumas sian funkcion sen ricevi salajron. Tial la rezulto de la koncerna agado centprocente iras al CDELI mem), fako de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, cele al akiro de al ĝi mankantaj dokumentoj.

## Ofte unikaj dokumentoj:

La listigitaj titoloj konsistas el plej ofte dokumentoj unikaj. Tial povos ilin akiri tiuj, kies mendoj alvenos unuavice. Niaj listoj eble registras titolojn intertempe elĉerpitajn. Tial antaŭ ol pagi, mendinto atendu nian fakturon.

## Aĉetmaniero:

Aĉetemulo sendu la liston de la titoloj, kiujn li ŝatus akiri, al la poŝta adreso de CDELI (bonvolu skribi tre legeble) aŭ al la reta adreso de CDELI : gacond.claude@ne.ch .Tiam nepre indiku la koncernajn titolojn, kaj ne la vic-numerojn, kiuj konstante ŝanĝiĝas sekve al elimino aŭ alveno de libroj. Responde vi ricevos fakturon, kiu listigos la reale disponeblajn brokantaĵojn. Tuj kiam vi estos paginta la koncernan monsumon, tiam vi ricevos registrite la rezervitajn dokumentojn. Sed tiu rezervado de dokumentoj daŭros nur dum trimonata periodo. Se dum tiu sufiĉe longa tempo ne alvenos la pago, tiam la rezervitajn brokantaĵojn ni remetos je dispono de aliaj interesatoj. Do nepre sin detenu de mendo interesato nepagipova. La prezojn ni indikas en euroj: €.

## Periodaĵoj:

La proponitaj periodaĵoj estas disponeblaj je la prezo de po € 2.- por revu-numero, senkonsidere pri ties paĝonombro. Koncerne al raraĵoj altvaloraj pli altaj prezoj estas indikitaj sur la listo mem.

## Iom da pacienco estas necesa:

Ni ordigas la mendojn, kiujn ni ricevas, laŭ ilia alvendato. Ĉiujn ni laŭvice kontentigas. Sed ĉar Claude Gacond ne ĉiam estas surloke kaj ĉar la serĉado de la dokumentoj, ĉefe por la revu-numeroj, rabas multe da tempo, nur malrapide ni povas efektivigi nian laboron. Ofte ekde la alveno de mendo ĝis ties kontentigo disvolviĝas pluraj semajnoj. Do mendinto havu iom de pacienco.

## Surloka esploro de nia brokanta materialo:

La surloka ekzameno de nia brokanta materialo eblas nur post fikso de preciza rendevuo kun Claude Gacond, kiu principe, se li ne ferias aŭ ne prelegvojaĝas, deĵoras en CDELI la matenojn lunde, marde, merkrede, kaj vendrede de la 8h30 ĝis la 11h30. Tiam li estas ĝenerale rekte atingebla telefone en CDELI mem.

# Eraroj:

La pretigo kaj konstanta ĝisdatigo de tiuj ĉi listoj konsistigas grandan laboron. Ni konscias, ke eraroj ne eviteblas. La registrado pli malpli alfabeta laŭ la titoloj montriĝis pli taŭga, ol la aŭtora. Kiam ni havas je dispono pli ol unu ekzempleron, tion ni mencias inter < >.

# Kontaktadreso:

Ĉiuj mendoj, korespondaĵoj kaj eblaj rendevu-petoj direktiĝu al: CDELI, Biblioteko de la Urbo, Strato Progrès 33, poŝtfako 3034, CH-2303 La Chaux-de-Fonds (Svislando).
Telefono: el Svislando: 032 967 68 55; el eksterlando: prefikso por Svislando + 32 967 68 55.
La fakso de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds estas: el Svislando: 032 967 68 29; el eksterlando: prefikso por Svislando + 32 967 68 29. Ĉiam nepre indiku:"por CDELI".
Kontoj: Ĉiuj pagoj iru ĉu en Svislando al la poŝta ĉekokonto 23-4669-1 de **Esperanto perkoresponde, Claude Gacond**, 2301 La Chaux-de-Fonds**, kun la indiko:"por CDELI + minimumaj klarigoj**. Eblas ankaŭ pagi per euroj al la franca banko **Crédit agricole mutuel de Franche-Comté, FR-25084 Besançon cedex 9, por la konto Gacond Claude 50648227010, kun la indiko: "por CDELI + minimumaj klarigoj.**